SCIENCA REVUO, oficiala organo de ISAE
Vol. 35 (1984), n-ro 1 (147): sociscienca kajero

**Eldonanto:** Internacia Scienca Asocio Esperantista (ISAE)
**Ĉefredaktoro:** *RNDr. Josef Kavka, CSc., Lužná 7, CS-160 00 Praha 6 — Vokovice,* Ĉeĥosl.
**Grafika redaktoro:** Bruĉjo Kasini, «Edistudio», *c. p. 213, I-56100 Pisa,* Italujo
**Administranto por la pagipovaj landoj:** «Edistudio», pĉk 12230561, Italujo
**Administranto por la nepagipovaj landoj:** *Dr. Václav Hník, CSc., Fakulta architektury ČVUT, Thákurova 7 — CS-166 34 Praha 6 — Dejvice,* Ĉeĥoslovakio
**Kompostis:** «Composit», *via Giordano Bruno 8, I-56100 Pisa,* Italujo
**Enpaĝigis:** «Edistudio», *c.p. 213, I-56100 Pisa,* Italujo
**Presis:** *Tecnostampa coop r.l., Pisa* Italujo

## Reguloj por la aŭtoroj:

1. Verki laŭeble pri sia propra originala esplorado tiel, ke ĝin komprenu eĉ alifakaj sciencistoj;
2. Sendi al la ĉefredaktoro la tekston en 2 ekzempleroj, klare tajpitaj sur maldika papero;
3. Maŝinskribi normallitere en la tajp-areo de 165 mm × 250 mm, kun la liniado $1^1/_2$, t.e. kun 40 linioj surpaĝe;
4. Ĉiun vorton neesperantan substreki ondlinie (por la kursiva komposto), dum rektlinia substreko signifas komposton dikliteran;
5. En la teksto noti lokojn, kie troviĝu eventualaj figuroj;
6. Ne forgesi referenc-liston;
7. Aldoni koncizan resumon en sia gepatra lingvo.

## Estraro de ISAE:

**Prezidanto:** Prof. D-ro *Carl Støp-Bowitz, Camilla Colletts vei 3, N- Oslo 2,* Norvegio
**Vicprezidantoj:** Prof. *Sin'itirô Kawamura, 424-7 Kinasityô Huzii, Takamatu, 760,* Japanio
Prof. *Vasil Peevski* D-ro *hc., Gogol 9, BG-1504 Sofia,* Bulgario
**Ĝenerala sekretario:** Inĝ. *Christian Darbellay, Jostenallee 45, D-4040 Neuss 1,* FRG
**Sekretario-kasisto:** Prof. *Paul E. Kustaanheimo, Danmarks Tekniske Højskole, 040 DIA-E, DK-2800 Lyngby,* Danlando
**Aliaj estraranoj:** S-ro *Rüdiger Eichholz,* direktoro de TC-ISAE, *R.R.I, Bailieboro, Ontario, K0L 1B0,* Kanado
D-ro *W.A. Verloren Van Themaat,* direktoro de IC-ISAE, *Volkerakstraat 38I, NL-1079 XT Amsterdam,* Nederlando
D-ro *Josef Kavka CSc., Lužná 7, CS-160 00 Praha 6 — Vokovice,* Ĉeĥoslovakio
S-ro Bruĉjo Kasini, *c. p. 213, I-56100 Pisa,* Italujo
D-ro *Václav Hník CSc., Podjavorinské 1609/6, CS-149 00 Praha 4 — Chodov,* Ĉeĥoslovakio
D-ro *Gerhard Kalckhoff, Schuckertstraße 14/XI, D-8000 München 70,* F.R. Germanio



# La politika ekonomio de *Adam Smith* — kaj la ekonomiko de nia tempo

*Bo Sandelin* (Svedio)*

## 1. Enkonduko

Mi komencu per konfeso: Kvankam mi profesie okupiĝis pri ekonomiko de post dek kvin jaroj, nur en la lastaj jaroj mi studis tiun verkon, kiu estas rigardata la historia fundamento de ekonomiko, nome tiun de la skoto *Adam Smith* pri la prospero de nacioj (1776). Tamen, mi ne devas honti antaŭ miaj kolegoj. Pro la «tempa provincialismo» — uzante la vortojn de *Lionel Robbins* — kiu regas en la fako, ne estas granda merito dediĉi penon al tio, kio estis verkata antaŭ pli ol ducent jaroj. Troviĝas ja en la moderna ekonomiko tiom da netrovitaj optimumkondiĉoj kaj tiom da nedeterminitaj parametroj, kiuj atendas esti metataj en la lumon! Citaĵo de klasikulo povas esti ornamaĵo, sed apenaŭ pli.

Ĝenerale homoj — origine ankaŭ mi mem — ricevas sian opinion pri la klasikuloj de ekonomiko per elŝiritaj fragmentoj aŭ trosimpligita resumo, kiu ofte siavice baziĝas sur sekundara fonto. Kompreneble, tiel formiĝinta bildo estas tre nekompleta. Nia emo ekstrapoli facile igas nin kompletigi ĝin erare. «La nevidebla mano» — konata esprimo de *Smith* — estas ofte menciata, kaj la leganto faras la konkludon — se ĝi ne estas eksplicite donata al li — ke en stato, kie la fortoj de la merkato senbride ludas, *Smith* vidas harmonian kaj bone funkciantan socion sen konfliktoj. La ekonomia recepto de la klasikuloj estis *«laissez-faire»* («lasu fari», ne intervenu), oni ofte aŭdas; do, la ŝtato nur konservu leĝobeon kaj ordon en la socio.

Multo estas direbla pri tiaj imagoj. Eble *Robbins* ne troigas, kiam li diras, ke en tiaj interpretoj la lokoj de la klasikaj ekonomikistoj «estas okupitaj de aro de mitologiaj figuroj, kiuj portas la samajn nomojn, sed kiuj estas ekipitaj per opinioj, kiuj estas preskaŭ kontraŭaj al tiuj, kiujn la originaloj posedis. Tiuj manekenoj vere estas tre malicaj estuloj. Ili estas instrumentoj aŭ

* D-ro ekon., docento pri ekonomiko ĉe la universitato de Gotenburgo, *Viktoriagatan 30, S-411 25 GÖTEBORG*

lakeoj de la kapitalistaj ekspluatistoj — mi kredas, ke tio montras la veran stilistikan aromon. Ili ne povas imagi al si alian taskon por la ŝtato ol tiun de la noktogardisto. Ili defendas tiajn salajrojn, ke estas apenaŭ eble ekzistadi, kaj estas tute indiferentaj pri la bonstato de la laborista klaso» (p. 5).

Tiu, kiu — ekipita per popularaj vulgaropinioj pri *Smith* — komencas legi la verkon de 1776, faros interesajn eltrovojn: La «nevidebla mano» ne estas prezentata kiel universala instrumento por la direktado de la socio; la *laissez-faire*-recepto havas plurajn gravajn esceptojn; la kapitalista klaso estas konsiderata malsimpatia, dum laboristoj kaj etbienuloj havas plenan kunsenton de *Smith*.

La unuan parton de tiu ĉi eseo mi dediĉos al tiaj modifoj de la trosimpligita aŭ erara bildo de *Smith*. Tio ĉi ja estas dirita antaŭe; la literaturo pri *Smith* estas vastega. Tamen, la nuancita bildo malmulte disvastiĝis ekster la rondo de specialistoj. Tial estas motivite prezenti la temon.

En la lasta parto de la eseo mi plivastigos, aŭ, pli ĝuste, turnos la perspektivon iomete. Ekonomikaj tekstoj nuntempe plurrilate diferencas de tiuj de la klasikuloj. Tiel estas koncerne la opinion pri la konvenaj enhavo kaj amplekso de la fako. Tiel estas koncerne la akcenton sur metodo kompare al enhavo, kaj tiel estas koncerne la manieron prezenti siajn ideojn. Mi argumentos, ke — kvankam la kolektita ekonomika scio kreskis — la evoluo ne en **ĉiuj** rilatoj estis pozitiva.

## 2. La homaj ecoj laŭ *Smith*

La denaskaj ecoj de la homo havas fundamentan signifon por *Smith*, kiam temas pri lia kompreno de la socio. Tiuj homaj ecoj, laŭ *Smith*, povas esti iomete modifataj per edukado kaj instruado, sed esence ili devas esti akceptataj en siaj originalaj kvalitoj. La institucioj de la socio devas esti formataj el tiu premiso.

Kiuj do estas tiuj homaj ecoj? Unue, la homo estas **egoisma** kaj strebas al **plibonigo de sia stato.** Tiuj karakteraj trajtoj de la homo povas prosperigi la socion, eĉ se la institucia kadro ne estas la plej favora. Kritikante la francon *Quesnay*, *Smith* diras:

«Ŝajnas, ke li ne konsideris, ke la natura strebado de ĉiu homo ĉiam plibonigi sian staton estas vivprincipo en la socia organismo kaj ke tiu principo en pluraj okazoj povas preventi kaj korekti malbonajn efikojn de ekonomia politiko, kiu iugrade estas kaj partieca kaj premanta. Kvankam tia politiko sendube malakcelas, ĝi ne ĉiam povas tute haltigi la naturan progreson de nacio al abundo kaj prospero, kaj ankoraŭ malpli regresigi ĝin» (IV.ii.28)*



*Smith* klare konsciis, ke ekzistas esceptoj de la regulo, ke la homo strebas por sia bono. Li pritraktas drinkadon kaj diboĉadon. La malŝparemulo estas skurĝata — tiu ja nur serĉas kontentiĝon por momento. Ankaŭ tiu, kiu obeas al modkapricoj estas bedaŭrinda, sed feliĉe «pro naturaj kaŭzoj, tia stulteco povas etendiĝi nur al malmultaj» (IV.ii.41).

Ĉu la normala homo laŭ *Smith* havas pli da ecoj ol egoismon? Parenca eco estas la «emo negoci kaj interŝanĝi unu objekton kontraŭ alia» (I.ii.1). Tio diferencigas la homon de la bestoj. «Neniu iam vidis hundon fari justan kaj intencan inerŝanĝon de unu osto kontraŭ alia kun alia hundo» (I.ii.2).

Apud la homaj inklinoj troviĝas alia grava fakto: Origine homoj estas sufiĉe similaj. «La diferenco inter la plej malsimilaj individuoj, ekz. inter filozofo kaj ordinara portisto, ŝajnas dependi ne tiel multe de la naturo kiel de moroj, kutimoj kaj eduko» (I.ii.4). Sed la emo negoci kaj interŝanĝi kondukas al specialigo kaj meto de homoj en malsamajn fakojn, kio pligrandigas la originajn diferencojn.

## 3. La natura libero kaj la funkciado de la ekonomio

Kompreneble, *Smith* bone konis la pensojn de la filozofoj pri natura juro. Ĉefe per *Grotius* kaj *Pufendorf* li estis influita de tiuj ideoj. La «natura libero» kaj similaj konceptoj de *Smith* estas ekzemplo pri tiu influo.

Kion *Smith* konkrete volis inkludi en la «natura libero?» Ni havos ideon pri tio, esplorinte, en kiuj situacioj tiu aŭ similaj esprimoj aperas. Farinte tion, ni trovas, ke ĝi inter alie signifas rajton libere elekti kaj ŝanĝi profesion (I.x.a.1, kp. I.x.c.12). Ĝi signifas rajton restadi en tiu paroĥo, kie oni elektis loĝi (I.x.c.59). Ĝi signifas liberon komerci kun aliaj landoj, sed ofte la leĝoj faris krimon el tio, kvankam «la naturo neniam intencis tiel» (V.ii.k.64). Ĝi signifas liberon ankaŭ en la enlanda komerco (IV.v.b.15).

Aliajn ekzemplojn ni trovas en okazoj, kie ne estas dezirinde, ke la natura libero regu, kvankam ĝi estas eldirite «natura». Malhelpi al bankisto emisii

* La referenco estu legata: Libro IV, ĉapitro ii, paragrafo 28 de *Smith* (1776).

monbiletojn aŭ al privatulo akcepti ilin «estas evidenta atenco kontraŭ la natura libero». Same estas «la devo konstrui brulŝirmajn murojn». Malgraŭ tio, *Smith* argumentas, ke en tiaj okazoj limigo de la libero estas ĝusta, ĉar «tiuj formoj de ies natura libero, kiuj endanĝerigas la sekurecon de la tuta socio, estas kaj devas esti limigitaj per leĝoj» (II.ii.94).

Ni jam vidas, ke *Smith* ne estis dogmema apologianto de senlima libero. Pragmatismo gvidis lin. La «natura libero» ne estis sankta. En tiuj okazoj, kie ĝia apliko malutilus al la tutaĵo, *Smith* postulis limigon. Iuj volas interpreti tion en terminojn de moderna ekonomika teorio, dirante, ke laŭ *Smith* estu interveno en okazoj de «eksteraj efikoj» aŭ «kolektivaj utilaĵoj».

En ceteraj okazoj *Smith* preskribis, ke la baza regulo estu aplikata, t.e., la «natura libero» regu. La homaj ecoj — strebi al sia propra bono kaj negoci — tiam favorus la kolektivan bonon, malgraŭ tio, ke la unuopaj individuoj agas egoisme. La emo negoci kaŭzis dividon de la laboro, kio siavice akcelis la produktadon. (Ni baldaŭ vidos, ke *Smith* trovis ankaŭ malfeliĉajn rezultojn de la labordivido.) Homoj profitas de la, pro specialigo, pli granda totala produktorezulto, ne pro altruismo de la produktantoj, sed pro ilia egoismo. «Ne de la bonkoreco de la buĉisto, la bierfaristo aŭ la bakisto ni atendas nian tagmanĝon, sed de ilia konsidero pri sia propra intereso. Ni turnas nin ne al ilia humaneco sed al ilia sinamo, kaj neniam parolas al ili pri niaj bezonoj, sed pri iliaj propraj avantaĝoj» (I.ii.2).

Estas oportune konekse kun tio diri ion pri la «nevidebla mano». Probable neniu alia esprimo de *Smith* estas tiel vaste konata, kvankam li mem uzas ĝin nur pase. La «nevidebla mano» estas menciata unu fojon en la verko de 1776. (Krome, unu fojon en tiu de 1759.) Por vidi, en kia kunteksto tiu esprimo aperas, ni devas fari sufiĉe longan citaĵon:

«Kiam ĉiu individuo penas, laŭ sia kapablo, uzi sian kapitalon por apogi enlandan industrion kaj por direkti tiun industrion tiel, ke ĝia produktaĵo havu maksimuman valoron, tiam ĉiu individuo neeviteble agas por fari la jarenspezon de la socio kiom eble plej granda. Vere, li ĝenerale ne intencas favori la publikan intereson, nek scias kiom li favoras ĝin. Preferante subteni enlandan industrion al eksterlanda, li celas nur sian propran sekurecon; kaj direktante tiun industrion tiel, ke ĝia produktaĵo havas maksimuman valoron, li celas nur sian propran gajnon, kaj li estas en tiu ĉi okazo, kiel en pluraj aliaj, direktata de nevidebla mano favori celon, kiu ne estas parto de lia intenco» (IV.ii.9).

Do, kiam ĉiu individuo lokas sian kapitalon tiel, ke ĝi estas plej avantaĝa por li mem, li samtempe, laŭ la ĉefa regulo, lokas ĝin tiel, ke la enspezo de la tuta socio estas plej granda. La «nevidebla mano» povas esti rigardata metaforo por la kondiĉoj, kiuj havas tiun rezulton.



Ĉu *Smith* mem volis meti pli profundan, diecan sencon en la «nevideblan manon» ne estas tute klare, kaj malsamaj interpretintoj havas malsamajn opiniojn. La ideo pri harmonio inter strebado por propra gajno kaj socia prospero aperis jam en fora tempo. La greka eklezia patro *Ioannes Chrysostomos* (344-407 p.K.) konsideris tiel funkciantan ekonomion parto de dia plano. Iuj emas rigardi *Smith* malfrua reprezentanto de tiu religia ideo. Aliaj pli aŭ malpli sukcese provis refuti la ideon, ke *Smith* konsideris la «nevideblan manon» direktata de Dio.

La nefacilo malkovri la «veran» opinion de *Smith* parte dependas de tio, ke li ŝajne havas kontraŭajn opiniojn en malsamaj verkoj. En la verko de 1759, la plej multaj legantoj trovas bildon de bona, natura ordo direktata de Dio, dum la natura ordo en la verko de 1776 estas elpurigita je religiaj tonoj, kaj krome ne ĉiam estas bona. Germanoj enkondukis la esprimon *«das Adam Smith-Problem»* lige al tiu diferenco.

Mi ne kredas, ke oni zorgu tre multe pri tio, ke *Smith* eble donas kontraŭajn impresojn en la du verkoj. Pasis 17 jaroj inter iliaj publikiĝoj, kaj ne estas strange se oni modifas sian opinion dum tiom longa tempo. «La Prospero de Nacioj» estis publikigata laste, sed eble pli grava estas la fakto, ke nur tiu ĉi verko ĉefe temas pri konkretaj ekonomiaj problemoj. Do, la bildo donata en tiu verko estas pli interesa por ni, kaj en tiu bildo ne estas dia inspiro.

## 4. La mankohava libero

Laŭ la baza regulo de *Smith*, la lokado de la produktorimedoj estus totale plej rendimenta, se ĉiu kapitalisto rajtus loki sian kapitalon laŭ sia bontrovo, kaj se ĉiu metiisto, laboristo kaj komercisto povus serĉi tiun okupon kaj praktiki tiun komercon, kiun li volas, sen leĝa malhelpo. Sed, kiel ni jam diris, tio estis nur baza regulo, kaj *Smith* montras, ke ĝi ne ĉiam donas bonan rezulton, nek en malvasta ekonomia senco, nek en pli vasta, homa senco. Ni vidu kelkajn el liaj ekzemploj:

Internacia komerco, ankaŭ en sufiĉe liberaj formoj, ne ĉiam estis avantaĝa por ĉiuj partioj. *Smith* diras, ke la komerco kun Ameriko povus esti favora, kaj por la loĝantoj de Ameriko, kaj por tiuj de Eŭropo. Sed «la sovaĝa maljusteco de la eŭropanoj faris okazon, kiu devus esti utila por ĉiuj, ruiniga kaj detrua por pluraj el tiuj malfeliĉaj landoj» (IV.i.32). La cititajn vortojn

ni eble pli atendus trovi en pamfleto pri la «malegala interŝanĝo» ol en verko de tiu, kiu kutime estas konsiderata la ĉefa apologianto de libera komerco.

Alia okazo, kie *Smith* trovas nedezirindajn socialajn konsekvencojn de la libera ekonomia vivo, estas la divido de la laboro. La spirita kaj fizika mizero, kiu laŭ *Smith* estas rezulto de la labordivido, estas priskribita per tiaj vortoj en libro V, ke oni demandas sin, ĉu tio estas akordigebla kun la plaĉa bildo komence de libro I.

En libro I ni legas, ke la homa emo negoci kaj strebi por sia bono kaŭzis la dividon de la laboro. La konsekvencoj de tiu divido estas priskribitaj per favoraj vortoj. Ni estas instruataj ke «estas la granda multobligo de ĉiaspecaj produktoj, kaŭze de la divido de la laboro, kio en bone regata socio rezultigis tiun universalan prosperon, kiu etendiĝas al la plej malaltaj klasoj de la popolo» (I.i.10). Kaj en la enkonduko de ĉapitro 2 ni legas: «Tiu divido de la laboro, el kiu tiom da avantaĝoj devenis, ne origine estis rezulto de homa saĝo, kiu antaŭvidis kaj celis tiun ĝeneralan prosperon, kiun ĝi kaŭzis» (I.ii.1). Evidente, la divido de la laboro rezultigas nur bonon.

Sed, en libro V la priskribitaj konsekvencoj estas aliaj. Ni lasu *Smith* mem paroli:

«Kiam la divido de la laboro progresas, la okupoj de la plimulto de tiuj, kiuj vivas de sia laboro, tio estas la plimulto de la popolo, limiĝas al kelkaj tre simplaj manovroj; ofte nur unu aŭ du. Sed la intelekto de la plej multaj homoj estas necese formata de iliaj ordinaraj okupoj. Homo, kiu pasigis sian tutan vivon farante kelkajn simplajn manovrojn, kies efikoj ankaŭ estas la samaj aŭ preskaŭ la samaj, ne havas okazon ekzerci sian intelekton, aŭ ekzerci sian kapablon trovi rimedojn forigi malfacilaĵojn, kiuj neniam okazas. Tial li, kompreneble, perdas la kutimon de tia ekzercado, kaj ĝenerale fariĝas tiel stulta kaj nescia kiel estas eble por homa estaĵo. La malvigleco de lia menso igas lin malkapabla ne nur ĝui aŭ partopreni iun ajn racian konversacion, sed koncepti ĉian grandaniman, noblan aŭ teneran senton, kaj, sekve, li fariĝas malkapabla formi iun ajn ĝustan juĝon pri pluraj el la ordinaraj devoj de la privata vivo. Pri la grandaj kaj vastaj interesoj de sia lando li estas tute malkapabla juĝi; kaj se ne tre apartaj penoj estas faritaj por aliigi lin, li estas same malkapabla defendi sian landon en milito. La unuformeco de lia senmova vivo kompreneble koruptas lian kuraĝon kaj igas lin rigardi kun abomeno la malregulan, malsekuran kaj aventuran vivon de soldato. Ĝi eĉ koruptas lian korpan aktivecon, kaj igas lin malkapabla uzi sian forton vigle kaj persiste en iu ajn alia okupo ol tiu, por kiu li estas edukita. Lia lerteco en lia propra profesio ŝajnas, tiele, akirita je la kosto de liaj intelektaj, sociaj kaj militaj virtoj. Sed en ĉiu plibonigita kaj civilizita socio ĉi tio estas tiu stato, en kiun la laborantaj malriĉuloj, t.e. la plimulto de la popolo, necese devas fali, se la registaro ne intervenas por malhelpi ĝin» (V.i.f.50).

Ĉu tiu pesimista bildo vere akordiĝas kun la optimista bildo en libro I? Se ĝi akordiĝas, kiu do estas la opinio de *Smith* pri divido de laboro?

Mi ne kredas, ke necese estas kontraŭdiro inter libro I kaj libro V. En libro I *Smith* koncentriĝas al la efiko de la divido de la laboro sur la produktatan kvanton de varoj, kaj sur la materian prosperon, kiu rezultas el tio.



En libro V li ne neas la efikon de la divido de la laboro sur la prosperon — mezuritan per kvanto da varoj — sed li enkondukas kroman aspekton: la efikon sur la spiritan kaj korpan staton de la laboristoj. Li bone konsciis «la fremdigan problemon», por uzi modernan esprimon, aŭ, se ni preferas la interpreton de *Arrow*, ke «la rendimento kaŭze de la divido de la laboro havas sian prezon en la limigo de la amplekso de la individuo» (p. 160).

## 5. Kion la ŝtato faru kaj ne faru

Legante, kion *Smith* diras en libro V pri la taskoj de la ŝtato, kaj konsiderante tiujn proponojn por kaj argumentojn kontraŭ ŝtata intervenado, kiuj estas disŝutitaj en la tuta verko, ni akiras ideon pri kiagrade, laŭ *Smith*, la ekonomio evoluu laŭ siaj propraj leĝoj, kaj kiam estu interveno.

La baza ideo estis, ke la ŝtato intervenu malpli ol ĝi faris en la tiutempa Britio, kie la merkantilismo estis la reganta ekonomika doktrino. Interese estas, kial *Smith* volis limigi la ŝtatan influon. Aperas tri ĉefaj argumentoj:

Unue, li estis kritikema al la merkantilismo kiel doktrino kaj al la egoisma maniero, en kiu la kapitalistoj provis sin apogi sur ties principoj. Ĝi kaŭzis misrendimentan lokadon de la produktorimedoj, kaj la privilegioj de la korporacioj kaj la koncesiitaj monopoloj favoris nur unuopajn mastrojn kaj komercistojn je la kosto de la plimulto de la popolo. La reguligo de komercado kaj produktado estis altrudita de komercistoj kaj industriistoj, kiuj celis nur sian propran profiton. *Smith* ripete diras, ke «oni ne povas pridubi, ke estis la spirito de monopolo, kiu origine ĉi tiun doktrinon kaj inventis, kaj disvastigis» (IV.iii.c.10). Li ankaŭ instruas, ke «la egoisma sofismo de komercistoj kaj manufakturistoj estas, tiurilate, rekte kontraŭa al la intereso de la grandaj homamasoj» (IV.iii.c.10).

Do, laŭ *Smith*, la sistemo de doganoj, privilegioj kaj malpermesoj ofte devenis el privata intereso, kio malfavoris la vastajn tavolojn de la popolo. Tio suficus por kondamni la merkantilisman sistemon, almenaŭ tian, kia ĝi aperis en la praktiko. Sed *Smith* havis pli da motivoj.

Dua argumento, kiun oni ankoraŭ aŭdas en la politikaj debatoj, temas pri la kapablo de la ŝtataj organoj detale reguligi la ekonomion por la bono de la popolo:

«Ŝtatisto, kiu povus direkti privatajn homojn pri kiel ili uzu sian kapitalon, ne nur prenus sursin plej malnecesan prizorgon, sed ŝarĝus sin per aŭtoritato, kiu povas esti sendanĝere komisiita nek al unuopa persono, nek al kia ajn konsilantaro aŭ senato kaj kiu nenie estus tiel danĝera kiel en la manoj de viro, kiu estas sufiĉe malsaĝa kaj aroganta por imagi sin kapabla uzi ĝin» (IV.ii.10. Kp. IV.ix.51).

La tria argumento kontraŭ certaj specoj de ŝtata agado estas pli implicita, kaj eble tial ĝi estas pli-malpli malatentita en modernaj komentarioj pri *Smith*. Li distingas inter produktiva kaj neproduktiva laboro. (V. precipe libron II, ĉap. 2). Produktiva laboro konkretiĝas en varo, kiu restos, kiam la laboro finiĝis. Industria kaj terkultura laboroj estas bonaj ekzemploj. La produktivaj laboristoj konservas aŭ pligrandigas la socian kapitalon, kiam ili postlasas produktorezulton, kiu valoras almenaŭ tiom kion ilia propra subteno de nutraĵoj, iloj k.a.

Neproduktiva laboro estas diversaj servoj. Tia laboro malaperas, kiam ĝi estas farita. Kiel tian *Smith* rigardis la laboron de civilaj kaj militistaj oficistoj,pastroj, juristoj, kuracistoj, aktoroj k.a. La neproduktivaj devas, «kiom ajn honorindaj, utilaj aŭ necesaj iliaj servoj estu», sin vivteni de produktoj faritaj de la produktivaj laboristoj.

Se la neproduktivaj estus tro multaj, ilia subteno dum unu periodo postulus tiel grandan parton de la produktoj, ke ne estus eble konservi la tutan kapitalon (aŭ, alivorte, postulus tiom multe, ke malpli da produktivaj laboristoj povus esti subtenataj la postan periodon). La produktorezulto malgrandiĝus (II.iii.30).

Ĉi tie ni ne kritiku tiun analizon de *Smith*. Sufiĉas scii, ke li rigardas servojn kiel neproduktivan laboron kaj ke la ŝtatdungitoj grandparte okupiĝas pri tia laboro, kiu — se ĝi estas tro ampleksa — haltigas la ekonomian progreson. Li diras eksplicite, antaŭ ol li donas detalan klarigon, ke «grandaj nacioj neniam malriĉiĝas pro privataj, sed kelkfoje pro publikaj malŝparemo kaj misadministrado. La tuta, aŭ preskaŭ la tuta, publika enspezo estas en la plej multaj landoj uzata por subteni neproduktivajn manojn» (II.iii.30). La konkludo, ke tio ĉi estas unu kaŭzo por limigi ŝtatan agadon, estas tiel proksima, ke eble tial *Smith* lasas al ni mem tiri ĝin.

Resume, ni trovis ĉe *Smith* tri kaŭzojn por limigi la taskojn de la tiama ŝtato. La unua estis, ke obeado al la principoj de la merkantilismo pri ŝtata interveno kaŭzus maloptimuman lokadon de la produktorimedoj, kio en la praktiko pligraviĝis, ĉar la efektivaj reguloj estis enkondukitaj post trudpetoj de kapitalistoj, kiuj celis nur sian propran profiton. La dua temis pri la malkapablo de ŝtatistoj direkti tutan nacian ekonomion. La tria koncernis la



karakteron de la laboro de oficistoj kaj politikistoj: Tia laboro estis neproduktiva, kaj tiuj, kiuj faris tian laboron, devis vivi el la produktoj de la produktivaj laboristoj.

La nun dirito ne signifas, ke *Smith* volis forigi ĉian ŝtatan agadon. La ŝtato havis plurajn gravajn taskojn, kaj nun estas tempo, ke ni ekzamenu, kion ĝi faru. Ĝi havu, laŭ *Smith*, tri ĉefajn devojn (v. libron V), sed krome ni trovas diversajn aliajn ŝtatintervenojn, kiujn *Smith* aprezas, kaj kiuj modifas lian sintenon al la libera ekonomio.

Unu ĉefa devo estas protekti la socion kontraŭ atakoj de aliaj socioj, t.e. zorgi pri la defendo. Tiun taskon ja havis eĉ la pura «noktogardista ŝtato». Tial ne estas interese perdi pli da vortoj pri tio. La dua granda devo estas same nepre bezonata: zorgi pri interna ordo kaj juĝado en la lando.

Sed, jam per la tria ĉefa devo *Smith* foriĝas de tiu noktogardista ŝtato, kiun — laŭ kelkfoja diro — li proponas. Temas pri «starigado kaj tenado de tiuj publikaj institucioj, kiuj, kvankam ili povas esti plej avantaĝaj por granda socio, tamen estas de tia naturo, ke la profito neniam povus sufiĉi por repagi la elspezojn al individuo aŭ malgranda nombro da individuoj kaj pri kiuj oni tial ne povas atendi, ke individuo aŭ malgranda nombro da individuoj ilin starigos aŭ tenos» (V.i.c.l.). Ree ni trovas: *Smith* konsciis, ke ĝenerala politiko de «*laissez-faire*» ne estas solvo. La tria ŝtata devo inkludas tiajn utilaĵojn kiel ŝoseojn, havenojn, pontojn, kanalojn, poŝton, edukadon k.t.p.

Lia interesiĝo pri edukado estas grava, ĉar ĉi tie li montras sian fundamente humanisman komprenon kaj lasas, ke ĝi superregu malvastajn ekonomiajn vidpunktojn. La antaŭe menciita analizo de la bedaŭraj sekvoj de la labor-divido aperas en tiu ĉi kunteksto. Lerneja instruado estu rimedo malhelpi degeneron kaj krudigon de la laborista klaso pro la detruanta karaktero de industria laboro. Kaj tiun instruadon la ŝtato prizorgu, eĉ se ĝi ne profitas de ĝi, do, pro pure humanismaj kaŭzoj (V.i.f.61).

Laŭ *Smith* la publika agado devus esti financata ne nur per impostoj, sed grandparte rekte de la utiligantoj. Li pensis, ke ŝoseoj, kanaloj, pontoj kaj havenoj povus esti kaj konstruataj kaj tenataj per uzkotizoj, proporciaj al la pezo aŭ la tunaro de la veturiloj aŭ ŝipoj. Tia uzpago ne estus nepra, sed povus esti oportuna. La instruado de la infanoj povus parte esti financata per «tiel malalta kotizo, ke ankaŭ ordinara laboristo povus pagi ĝin». Troviĝas ankaŭ aliaj publikaj institucioj, por kiuj uzkotizoj estus eblaj.

La opinio de *Smith* pri financado igis *E. G. West* malfidi la provojn inter-

preti la starpunkton de *Smith* en terminoj de «kolektivaj varoj» en la senco de *P. A. Samuelson:* Se uzantoj estas klare distingeblaj de neuzantoj — kion *Smith* ja supozas, kiam li proponas uzkotizojn — la moderna ekonomika koncepto «kolektivaj varoj» ne estas aplikebla. Pri tio oni povas konsenti, kondiĉe ke oni komprenas «kolektivajn varojn» kiel absolutan koncepton anstataŭ gradan. Eble oni ankaŭ povus konsenti, ke la enkondukaj vortoj de *Smith*, kie li parolas pri publikaj institucioj, kiuj «estas de tia naturo, ke la profito neniam povus sufiĉi por repagi la elspezojn al individuo» apenaŭ akordiĝas kun la diskuto pri financado per uzkotizoj.

Estas pli malfacile sekvi *West*, kiam li en plua paŝo argumentas, ke *Smith* efektive opiniis, ke la registaro prizorgu, ke la instituciaj kadroj estu tiaj, ke estas eble por privataj kompanioj oferti la plimultajn el la funkcioj, kiuj estas pritraktataj en libro V. En la sekcio, sur kiu *West* sin apogas, *Smith* pritraktas preskaŭ nur kompaniojn por ŝipirado kaj komercado kun aliaj landoj (V.i.e.). Li konstatas, ke tiuj kompanioj malofte vivas longe, precipe se ili ne havas monopolan privilegion. En la fino de tiu longa sekcio *Smith* diras, ke la solaj entreprenoj, kiujn ŝajne estas eble irigi kiel akciajn kompaniojn, sen monopolaj privilegioj, estas tiuj, kiujn oni povas irigi laŭ ripetaj, rutinaj principoj. Por permesi fondadon de akcia kompanio ankaŭ estu postulate, ke ĝia agado estu neordinare kapitalbezona. Tiuj tri kriterioj — rutina irigado, neordinare utila kaj neordinare kapitalbezona agado — laŭ *Smith* estas plenumataj nur de bankoj, asekuraj kompanioj, kanaloj kaj akvocentraloj.

Estas tute klare, ke *Smith* ne pledas, ke tiaj entreprenoj estu irigataj de privatuloj. Li nur diras, ke ili povus esti irigataj kiel privataj akciaj kompanioj, sen monopolprivilegioj, kaj kredeble doni bonan rezulton. Kaj ne estas kontraŭdiro inter la antaŭa parto de la ĉapitro, kie li mencias i.a. kanalojn, diskutante, kion la ŝtato prizorgu, kaj la posta parto, kie kanaloj kaj akvocentraloj estas menciataj kiel ekzemploj de entreprenoj, kiuj plenumas la postulojn, kiujn *Smith* metas por akcepti la **eblon**, ke entrepreno estu irigata kiel akcia kompanio. Li ne diras, ke la ŝtato kreu nur leĝan kadron, por ke privatuloj kaj privataj kompanioj poste prizorgu ĉiajn ekonomiajn funkciojn.

Antaŭ ol ni forlasos la rolon de la ŝtato, ni montru al kelkaj unuopaj sugestoj pri ŝtataj intervenoj. Tiuj akcentas la bildon pri *Smith* kiel pragmatulo kaj neniel kiel dogmema apologianto de *«laissez-faire»*:

Povas esti rekomendinde fiksi maksimuman leĝan interezon por malhelpi



uzuron (II.iv.15). Ankaŭ povas esti oportune devigi ĉiun, kiu volas fariĝi sia propra mastro, trapasi pridemandadon aŭ ekzamenon (V.i.f.54-57, V.ii.5-6). Tiu propono estas bazita sur la deziro de *Smith*, ke ĉiu havu tiun elementan edukadon, kiun la ŝtato devus prizorgi.

Leĝo, kiu devigas la terposedantojn en la anglaj kolonioj antaŭ certa tempopaso ekkulturi parton de sia tero, estas menciata de *Smith*, evidente kun aprobo (IV.vii.b.18). La kontrolstampoj sur tolaj kaj lanaj ŝtofoj ankaŭ estas bonaj (I.x.c.13).

Smith forte apogis la **principon** pri libera komerco inter nacioj, sed eĉ ne tiu estis sankta por li. Ekzistas laŭ li okazoj, kiam oni per doganoj kaj aliaj rimedoj apogu la enlandan produktadon. Tian okazon oni havas, kiam iu branĉo estas necesa por la nacia defendo. La Navigacian Akton — unu el la plej konataj aktoj kontraŭ libera komerco — li sekve karakterizas kiel «eble la plej saĝan el ĉiuj komercaj reguloj en Anglio» (IV.ii.30), ĉar tenado de granda ŝiparo kaj funkcianta ŝipirado estis grava por la defendokapablo de Britio. Ankaŭ eksportsubvenciojn li proponas, se tiuj estas necesaj por vivteni industrion, kiu estas grava por la nacia defendo (IV.v.a.36). Simile, se enlanda importkonkurenca industrio estas ŝarĝita per imposto, tiam estas oportune kun dogano (IV.ii.31). La dogano farus, ke la enlanda industrio ne estus malfavorata, kompare kun la eksterlanda.

Evidente, la ŝablonbildo pri *Smith* kiel nekompromisema apologianto de libera komerco devas esti nuancata.

## 6. La klassimpatioj de *Smith*

Ni jam konstatis, ke koncerne la liberecon de la individuo kaj la rolon de la ŝtato *Smith* pledas por principo, de kiu li tamen ne hezitas devii plurfoje. Eble tio indikas iom da ŝanceliĝo. Sed, kiam temas pri liaj klassimpatioj, ne ekzistas ŝanceliĝo. Siajn simpatiojn li senhezite donas al la malgranduloj, al la neposedantoj. Tio estas dokumentita en pluraj kuntekstoj, el kiuj ni povas elekti kelkajn:

Al la laboristoj estis malpermesite fondi sindikatojn. Por mastroj ne ekzistis simila malpermeso. Kaj, ankaŭ se la mastroj ne formale kuniĝis, troviĝis «ĉiam kaj ĉie senvorta sed konstanta kaj unuforma interkonsento ne altigi la salajrojn», aŭ eĉ interkonsento, ke oni malaltigu ilin (I.viii.13). Priskribante la malegalajn kondiĉojn en la batalo inter laboristoj kaj mastroj, Smith vere indignas.

Liaj simpatioj al la laboristoj evidentiĝas ankaŭ, kiam li diskutas la efikojn de altaj salajroj. Altaj salajroj estas bonaj, diras *Smith*, kaj ili ne kaŭzas mallaboremon, kiel kelkaj opinias. La emo preni tri libertagojn en unu semajno, se oni dum kvar tagoj povas perlabori tion, kion oni bezonas por sia vivteno, dependas de trolaciĝo dum la kvar tagoj. Kaj «se mastroj ĉiam obeus al prudento kaj humaneco, ili ofte havus kaŭzon moderigi prefere ol vigligi la diligentecon de multaj el iliaj laboristoj» (I.viii.44).

*Smith* revenas al altaj salajroj en la ĉapitro pri profito. La koncerna sekcio finiĝas per jenaj vortoj:

> «Niaj komercistoj kaj industriistoj multe plendas pri la malbonaj efikoj de altaj salajroj, kiuj altigas la prezojn kaj pro tio malpliigas la vendadon de iliaj varoj, kaj hejme kaj eksterlande. Ili diras nenion pri la malbonaj efikoj de altaj profitoj. Ili silentas pri la malutilaj efikoj de iliaj propraj gajnoj. Ili plendas nur pri tiuj de aliaj homoj» (I.iv.24).

Similaj atakoj troviĝas en sekcio pri industria politiko. Ni ankaŭ legas, ke ĉiam estas juste, kiam parlamento reguligas salajrojn favore al la laboristoj. Kontraŭe, se la reguligo favoras la mastrojn, ĝi ne necese estas justa, ĉar la mastroj funkcias kiel konsilantoj de la politikistoj (I.x.c.61). Eble ni povas diri, ke kapitalismo — almenaŭ en malgranda skalo — pli ol kapitalistoj plaĉis al *Smith*.

## 7. La ekonomika lingvo de *Smith* kaj tiu de hodiaŭ

Kiam ni en la sekvontaj partoj de tiu ĉi eseo faros interligon kun la moderna ekonomiko, ni koncentriĝos al aliaj aspektoj, ol ni faris ĝis nun. Do, ni ne plu diskutos tiajn politikajn elementojn kiel antaŭe. Anstataŭe, ni pritraktos demandojn de pli esplorstrategia aŭ metodologia karaktero. La komparo kun *Smith* estos sur sufiĉe ĝenerala nivelo, kaj ofte nur aludata.

Kvankam esencaj tezoj en la moderna ekonomiko troviĝas jam en la verko de *Smith*, fundamentaj diferencoj ekzistas en pensmaniero kaj apero de la scienco. Unu evidenta, eble triviala diferenco, kiun povas observi ankaŭ laikoj, troviĝas en la prezentado de esploroj. (La maniero prezenti rezultojn de esplorado ofte estas, sed ne nepre estas, ligita al la metodo, kiun uzas la ekonomikisto). *Smith* skribis nur prozon, eĉ facile legeblan, kio nun plej ofte ne okazas en verkoj kun sciencaj pretendoj. Parte, la kaŭzo estas, ke statistikaj kaj matematikaj metodoj montriĝis pli vaste uzeblaj, ol oni antaŭe kredis. Alia esenca kaŭzo kredeble estas, ke la nunaj ekonomikistoj unue skribas por siaj kolegoj, kaj skribas tiel, kiel tiuj aprezas. *Smith*, kontraŭe, skribis por pli vasta publiko kaj verŝajne unue direktis sin al politikistoj. Li ja parolas pri la ekonomiko «kiel branĉo de la scienco de politikisto aŭ leĝofaranto» (IV.1).

La evoluo al teĥnike pli komplika skribmaniero sendube en certa senco antaŭenpuŝis la limojn de nia scio. Ni kredeble ne havus tiujn sciojn, kiujn ni ricevis per ekonometrikaj makromodeloj pri la rilatoj inter diversaj ekonomiaj grandoj, se la ekonomikistoj ne permesus al si uzi statistikan/-matematikan skribmanieron. Sen tiu rajto en la prezentado oni kredeble ne uzus ekonometrikajn metodojn en la esplorado, kaj eĉ se oni uzus tiajn en la esplorado, nur vorta, proza prezentado malebligus por kolegoj havi ekzaktan informon pri la procedo. La komunikado inter sciencistoj en sama kampo grave malfaciliĝus.

Sed, estas ne nur avantaĝoj en pli teĥnika prezentado. Ne ĉiam ĉio interesa estas priskribebla per matematika aŭ ekonometrika modelo. Sed, laŭ la internaj fakaj kriterioj, kiuj estas influitaj de la bone renomaj natursciencoj, eleganta matematika prezentaĵo estas pli prestiĝa. Tial estas alloge uzi ĝin, eĉ kiam oni per tio devas neglekti esencajn faktorojn. Unu ekzemplo, al kiu ni povas montri de la pozicio de la postesaĝulo, estas la provoj analizi la problemojn de la t.n. evolulandoj per diversaj kreskomodeloj similaj al tiuj de *Harrod, Domar, Solow* kaj *Uzawa*. Hodiaŭ evoluekonomikistoj pli-malpli unuanime konsentas, ke pro tio oni dum pluraj jaroj troigis la signifon de ŝparado kaj kapitalformado, kiuj estas relative facile modeligitaj matematike, dum oni neglektis la gravan signifon de moroj kaj sociaj institucioj.

## 8. Tempa perspektivo kaj specialiĝo

Alia esenca diferenco inter *Smith* kaj la nunaj ekonomikistoj koncernas la tempan perspektivon de la analizo. *Smith* estis kaj ekonomihistoriisto kaj ekonomikisto. Li interesiĝis pri la longa perspektivo eble eĉ pli ol pri la mallonga. Kaj la longa perspektivo povus esti **tre** longa. Ekz. la prezo de arĝento dum la tempo de *Smith* estas komparata kun la prezo tricent jarojn pli frue!

Divido de laboro estas ofte prudenta principo kaj la disdivido de diversaj sciencoj en novajn memstarajn sciencojn ŝajnas natura, ĉar la kvanto de scioj kreskadas kaj ĉar unuopuloj povas regi nur limigitan kvanton. Sed la avantaĝoj devas esti komparataj kun la malavantaĝoj. Evidente la apartigo

de ekonomiko disde ekonomia historio, kiun faris i.a. la svedaj universitatoj, estas ne nur avantaĝa. Manko de scio pri ekonomia historio malfaciligas por ekonomikisto distingi strukturajn fenomenojn de konjunkturaj kaj li emas troakcenti la konjunkturajn. Krome, lia mankhava kono pri politikaj kaj instituciaj ŝanĝoj — spite de promesaj provoj reenkonduki tiajn en teoriajn modelojn dum la lastaj jaroj — faras, ke li emas neglekti tiajn en empiriaj analizoj, kio povas esti fatala por la konkludoj.

La apartigo certe estis same kosta por la ekonomihistoriisto. Ekonomika teorio estas aplikebla ne nur al hodiaŭaj ekonomioj, sed grandparte ankaŭ al estintaj. Manko de scio pri ekonomika teorio faras, ke la ekonomihistoriisto riskas fidi al porokazaj klarigoj, kiam ĝenerala ekonomika teorio donus pli konvinkan klarigon.

Difektoj pro specialiĝo sendube estas pli granda problemo por la hodiaŭaj ekonomikistoj ol por *Smith*, kies scienca laboro ampleksis plurajn fakojn. Ni restu ankoraŭ iomete je la «kostoj» de specialiĝo. (Ke troviĝas «enspezoj», estas triviale).

*De Witt Dearborn* kaj *Herbert Simon* per interesa eksperimento, referita de *Arrow* (p. 160), studis kiel la percepto pri diversaj problemoj kaj iliaj solvoj dependas de la speco de bazaj scioj de la koncerna persono. Partoprenis nombro de gvidantoj de komercaj entreprenoj. Ili havis diversajn specialaĵojn kiel vendadon, librotenadon kaj produktadon. Oni prezentis al ili multajn informojn pri malsukcesa entrepreno. Ĉiuj ricevis ekzakte samajn informojn. Poste ili devis analizi, kial la entrepreno malsukcesis kaj kiel ĝi povus sukcesi. Montriĝis, ke la ĉefoj pri vendado opiniis, ke la vendoklopodoj pliintensiĝu, ĉefo pri librotenado atentigis, ke la sistemo pri librotenado estas tiel malbona, ke la ĉefdirektoro ne povas superrigardi la situacion, ĉefo pri produktado insistis unue pri plibonigo de la produktometodoj, k.t.p.

La menciita ekzemplo montras ĝeneralan homan econ: Ni emas preteratenti esencajn faktorojn ekster nia specialaĵo, kaj troakcenti faktorojn en nia propra kampo. Ni rigardu ankoraŭ unu ekzemplon:

Dum pluraj jaroj la sveda ekonomio suferis de i.a. malgranda kreskado kaj struktura malekvilibro, kio sekvigis en pluraj lokoj malakcepteblan senlaborecon en la konkurenca sektoro de la ekonomio. Kelkaj ekonomikistoj tial publike, pli malpli senkondiĉe, asertis ke «la geografia transloĝiĝo» de la laboristaro devas pliiĝi.

Eble tiu medikamento ŝajnas bonega por tiu, kiu kutimiĝis rigardi nur tradiciajn ekonomikajn agregatojn. Sed mi kredas, ke ankaŭ renomaj ekonomikistoj povas esti malbonaj sociscienciistoj. Ĉu certe la postuloj pri pli da transloĝiĝoj sonus same laŭte, se tiuj, kiuj postulas tian politikon, estus studintaj, kion signifas la radikiĝo en loka medio por la sento de bonfarto kaj sekureco, kion signifas altrudita transloĝiĝo por la risko de stomaka ulcero, kora apopleksio kaj eksedziĝo, aŭ kion signifas transplantado de infanoj al fremda kaj ofte pli grandskala medio por malbonfarto kaj vandaleco en la lernejoj?

Ĉu el vastigita analizo eĉ rezultus, ke oni rekomendu al la politikistoj ne intence stimuli transloĝiĝon? Mi ne sufiĉe konas la plejparte sociologian literaturon pri la socialaj konsekvencoj de transloĝiĝoj. Tial mi povas esprimi min nur demandante. Sed la foresto de tiu problemkomplekso en la analizoj de la transloĝiĝpostulantoj miaopinie bonege ilustras la vortojn de *Arrow*, kiujn ni ĉiuj devus pripensi: «Specialiĝo konsistas antaŭ ĉio en specialiĝo de scio... Via percepto, via preferata mondkoncepto, via juĝo pri la relativaj ebloj de diversaj rezultoj estas diktataj de via sperto. Vi observis, ke certaj aferoj okazas, kaj vi konstatas certan regulecon. En kampoj, kie vi nenion lernis kaj nenion observis, vi ne rekonas regulecojn» (p. 160).

La klasikuloj estis malpli specialigitaj ol la modernaj ekonomikistoj. Tial ili perdis la avantaĝojn de specialiĝo, sed ankaŭ la malavantaĝojn en formo de tro limigita perspektivo. Ĉe *Smith* ni, sekve, trovas diversajn aspektojn de transloĝiĝoj. Ni trovas i.a. mildan varianton de tradicia ekonomika rezonado. Li diras ekz., ke se oni intencas forigi doganojn aŭ aliajn malhelpojn al internacia komerco, tio okazu malrapide kaj paŝe kaj sub pluraj klaŭzoj, ĉar «se ĉiuj altaj doganoj kaj malhelpoj estus tuj forigataj, malpli kostaj eksterlandaj samspecaj varoj povus flui tiel rapide en nian hejman merkaton, ke pluraj miloj da homoj tuj perdus siajn ordinarajn laborojn kaj vivrimedojn. La malordo, kiun tio kaŭzus, sendube estus tre konsiderinda» (IV.ii.40). Tamen, ĝi kredeble estus malpli granda ol oni kutime pensas, i.a. pro tio, ke la totala postulado de laboro estus proksimume la sama, kvankam ĝi povus okazi «en aliaj lokoj kaj pri aliaj okupoj» (IV.ii.41).

En alia sekcio *Smith* akcentas la maldezirindajn rezultojn, kiuj povas sekvi transloĝiĝon. Ĉi tie li ne limigas sin al tradicia ekonomika rezonado, sed ankaŭ konsideras la socian kontrolon. Li parolas pri viro el malalta klaso. Dum tiu loĝas en sia eta vilaĝo, ĉiuj konas lin, kaj li kondutas senripoĉe por konservi sian bonan reputacion. Sed, kiam li transloĝiĝas en grandan urbon, li tuj malaperas en nekonatecon kaj mallumon. «Neniu observas lian kondu-

ton, kaj tial li tre kredeble neglektas ĝin mem kaj forlasas sin al ĉia diboĉado kaj malvirto» (V.i.g.12).

Por *Smith* ekonomiaj kaj socialaj demandoj apartenis al la sama problem-komplekso.

## 9. Metodo kaj enhavo

La demando pri metodo kaj enhavo ofte estas proksima al — sed ne identa kun — la demando pri prezentado kaj enhavo. Ankaŭ pri metodo kaj enhavo *Smith* havis kuntenantan vidmanieron. La metodo neniam havis memstaran valoron, sed pravigis sian ekziston per la realaĵo, kiu estis analizata. Ankoraŭ estas tiel en bona ekonomiko, sed troviĝas multaj elstaraj reprezentantoj de la fako, kiuj metas misproporcie grandan gravecon je tio, ke la metodo estu teĥnike altgrada, kaj, sekve, misproporcie malgrandan gravecon je la ekonomia enhavo.

Ni rigardu ekzemplon. Recenzante doktoran disertacion, *Siven* konsentas, verdire, «ke unu ĉefa problemo de la disertacio (estas), ke la analizmetodoj grandparte direktas la elekton de demandoj. Plurloke en la disertacio la premisoj de la analizo estas ŝanĝataj... kvankam la ekonomia problemo ne postulus tion... La elirpunkto de ekonomika disertacio ja — tamen — devus esti grava ekonomia problemo ligita al realaĵo.»

La menciataj mankoj por eksterulo kredeble ŝajnas fundamentaj kaj tial tre gravaj. Sed la recenzisto ne opinias tion, ĉar li daŭrigas pardonante: «Dirinte tion, mi tuj volas atentigi, ke parte estas malfacile eviti tiujn problemojn. Tiu analizteĥniko, kiun (la aŭtoro) uzas, estas tiel komplika, ke multe da tiu tempo, kiun li alie povus uzi por pripensi pravecon kaj realecon, tutsimple ne estis disponebla». En la lasta alineo ni legas: «Konsiderante, kiel komplika estas tiu matematiko, kiun la aŭtoro uzas, estas mirinde, kiel malmultajn erarojn li faras. La aŭtoro per sia disertacio aperas kiel tre kompetenta kaj krea analizisto».

Tiu ĉi ekzemplo ilustras, kian troan aprezon multaj ekonomikistoj donas al teĥnikaj metodekzercoj. Tro ofte ŝajnas, ke oni donas valoron al la metodoj kiel tiaj, sendepende de tiuj realaj problemoj, al kiuj ili estas — aŭ devus esti — aplikataj. Tiam sofistika solvo de triviala aŭ sensenca problemo povas esti rigardata kiel merito anstataŭ manko de simpla prudento.

Ni restu iomete je la demando pri la rolo de la metodoj. La ekonomikon, kiel plurajn aliajn sciencojn, ni povas rigardi kiel konsistantan el diversaj sekcioj. La tasko de la ilsekcio estas krei tiujn ilojn, kiuj helpu nin akiri sciojn pri la realo. La **ilsekcio**, siavice, povas esti rigardata kiel konsistanta ĉefe el du subsekcioj: teorisekcio, kiu formulas teoriojn kaj metodsekcio, kiu ellaboras metodojn. **Teorio** pri ekz. estiĝo de la prezo en certa konkurencmerkato konsistas el ideo pri kiel diversaj faktoroj estas interligitaj kaj influantaj unu la aliajn, tiel ke la prezo estas determinata. La uzata **metodo** povas esti logika vorta rezonado, manipulado de matematika-analiza modelo, kalkulado de la koeficientoj kaj cetera analizo de ekonometrika modelo, aŭ eble io alia.



La iloj helpu nin studi la realan ekonomion. Ni diru, ke tio estas farata en la **praktiksekcio**, kiu estas la dua ĉefa sekcio. Tie oni studas ekz. kiel certa altigo de la oficiala diskonto efikis sur investadon, produktadon kaj pagobilancon, aŭ kiuj faktoroj kaŭzis, ke la kresko en la ekonomio konsiderinde ŝanĝiĝis.

La limo inter la sekcioj ne estas absoluta, kaj multaj ekonomikistoj laboras en ambaŭ ĉefsekcioj. Tiel faris *Smith* kaj la aliaj klasikuloj, kiuj konstruis ilojn — t.e. teoriojn kaj metodoj — kunlige kun la praktikaj sociaj problemoj, kiujn ili decidis analizi.

Nuntempe, tre specialiĝinte, multaj laboras en nur unu sekcio. La interŝanĝo de informoj inter la ilsekcio kaj la praktiksekcio estas ofte tre malvasta kaj kaŭzis, ke oni ellaboris neadekvatajn ilojn. Unu ekzemplo, kie la ilfaristoj ŝajne tute perdis kontakton kun la realo, troviĝas en la krimekonomiko. Mi pensas pri parto de la verkaro de *Gary Becker*, kaj pri tiuj, kiuj plue evoluigis lian ideon, ke por krei bonan teorion pri la kaŭzo de krima agado, oni povas «simple vastigi la ordinaran ekonomikan teorion pri elekto» (p. 170). Laŭ tiu ĉi vidmaniero, krima ago baziĝas sur racia kalkulo, simila al kalkulo de racie aganta entrepreno. Estas supozate, ke «persono faras krimon, se la antaŭvidata utilo superas tiun utilon, kiun li povus akiri, uzante siajn tempon kaj aliajn rimedojn alimaniere. Kelkaj homoj do fariĝas krimuloj, ne ĉar ilia baza interna instigo diferencas de tiu de aliaj personoj, sed ĉar iliaj gajnoj kaj kostoj diferencas» (p. 176).

Tia teorio pri la estiĝo de krimuloj kredeble kaŭzas nur rideton ĉe krimsociologoj, socialoficistoj, kriminalistoj kaj aliaj, kiuj spertis kiel homoj fariĝas krimuloj. Sed en matematika vesto tia analizo estas tre bela, kun derivoj, kiuj elegante montras la kondiĉojn de optimuma konduto. Ĉu la metodo direktis la teorion, tiel ke tiu estis adaptata al la esprimpovo de la diferenciala kalkulo?

Mi nun montris ekzemplon pri, miaopinie, malsukcesa scienca evoluo pro manko de kontakto kun la reala mondo. Kompreneble, troviĝas ankaŭ sukcesoj, kaj tiuj devus esti pli multnombraj ol la malsukcesoj. Mi havas respekton por, i.a., la atingoj dum la lastaj jaroj en la makroekonomiko, precipe tiu kun ekonometrika tendenco. Vere, ĝi kelkfoje prave estas kritikata pro «okazeco» kaj malfacile superrigardataj modeloj. Tamen, ĝi donis konsiderindajn novajn sciojn pri la interrilatoj en la ekonomio, ne nur kvalite sed ankaŭ kvante. Sed tio ja ne malpermesas al ni kritiki aliajn tendencojn, ekz. emon rigardi la ilojn — ofte en formo de tre abstraktaj modeloj de konstruitaj problemoj — kiel celojn anstataŭ rimedoj por kompreni sociajn problemojn. La klasikuloj ne suferis de **tiu** malfortaĵo.

La alia kaj iom diferenca demando — ĉu la elspezado por ekonomika esplorado estas optimume dividata inter evoluigo de iloj kaj aplikoj — estas malfacile respondata. Trarigardinte la gvidajn akademiajn fakrevuojn, oni eble havas la impreson, ke niaj scioj pri la ekonomio estus pli grandaj, se pli da energio estus dediĉita al konkretaj problemoj, eĉ se tio devus okazi je la kosto de la grandeco de la ilŝranko. Sed tio povas esti falsa konkludo, i.a. ĉar aplikaj studoj grandskale estas publikigataj en aliaj forumoj: libroj, popularsciencaj kaj malpli prestiĝhavaj fakrevuoj, k.s.

Cetere mi kredas, ke la distribuo de rimedoj **interne de** la ilsekcio — precipe inter teorievoluigo kaj metodevoluigo — estas almenaŭ same interesa, kaj mi kredas, ke ioma translokado de rimedoj de metoda al teoria laboro estus dezirinda. Ne estas ekz. malkapablo konstrui matematikajn modelojn aŭ fari ekonometrikajn kalkulojn, kio kulpas pri la malfacilo trovi akcepteblajn rimedojn kontraŭ «stagflacio», sed estas la manko de fruktodona **enhavo** en la modeloj, t.e. manko de bona teorio. Simile, nia kaduka kono pri la kaŭzoj de la frekvenca distribuo de personaj enspezoj — tiuj preskaŭ ĉie kaj ĉiam obeas al proksimume logaritme normala frekvenca distribuo — unue estas ligita al manko de konvinka teorio. Troviĝas multaj aliaj ekzemploj.

Resume, ekonomika esploro povas esti direktata al evoluigo de teorioj kaj metodoj, kaj al aplikado de tiuj iloj al praktikaj problemoj. Estus dezirinde, ke la evoluo dum la proksimaj jaroj estu tia, ke la ceteraj partoj atingu la nivelon de la metodoj. Precipe, la metodoj ne superregu en tiu senco, ke ili povas pardoni malbonan teorion aŭ neinteresan esplorobjekton.

Demando, kiu fine anoncas sin, sed kiun mi ne detale tradiskutu ĉi tie, jenas: Kiel la hodiaŭa ekonomiko estos konsiderata en historia perspektivo? Devus esti evidente, ke mi nek kredas, ke nia ekonomiko en **ĉiuj** rilatoj superas tiun de niaj antaŭuloj, kaj mi nek kredas, ke ĝi en ĉiuj rilatoj malsuperas la ekonomikon de niaj posteuloj. Dum malsamaj epokoj oni formulas malsamajn demandojn, kaj oni rigardas samajn problemojn de malsamaj vidpunktoj. Kun la vortoj de *Thomas Kuhn:* «Sciencaj revolucioj kaŭzas kaj perdojn kaj gajnojn, kaj la sciencistoj estas precipe blindaj pri la perdoj» (p. 167).



## Referencoj


*Arrow, K.J. (1979): «The Division of Labor in the Economy, the Polity, and Society», G.P. O' O Driscoll (red. — Adam Smith and Modern Political Economy, Iowa State University Press.*

*Becker, G. (1968): «Crime and Punishment: An Economic Approach». — J. polit. Econ., 169-217.*

*Kuhn, T.S. (1970): The Structure of Scientific Revolutions, (2-a eld.). — University of Chicago Press.*

*Robbins, L. (1952): The Theory of Economic Policy in English Classical Political Economy, — MacMillan, London.*

*Samuelson, P.A. (1954): «The Pure Theory of Public Expenditure». — Rev. Econ. Statist., 4, 387-389.*

*Sandelin, B. (1981): «Adam Smiths politiska ekonomi - och vår tids nationalekonomi», M. Lundahl (red.) — Ideologi, ekonomi och politk, Rabén & Sjögren, Stockholm.*

*Siven, C-H. (1980): «Arbetsmarknadens mikroorganismer». — Ekon. samfund. tidskr. 2, 129-132.*

*Smith, A. (1759): The Theory of Moral Sentiments. — Clarendon Press, 1976, Oxford.*

*Smith, A. (1776): An Inquiry into the Nature and Causes of the Wealth of Nations, — Clarendon Press 1979, Oxford.*

*West, E. G. (1979): «Adam Smith's Economics of Politics», G.P. O Driscoll (red.) — Adam Smith and Modern Political Economy, Iowa State University Press.*


## *Adam Smiths politiska ekonomi - och vår tids nationalekonomi*


*I populära framställningar beskrivs Adam Smith vanligen som en stark motståndare till statliga ingrepp i ekonomin. Det är emellertid en missvisande förenkling. I Wealth of Nations (1776) framträder Smith som en pragmatiker, som inte drar sig för att föreslå en rad av statliga åtgärder för att styra resursanvändningen i önskvärd riktning, Hans grundidé är emellertid att den fria marknaden är ett bra resursallokeringsinstrument.*

*Smith var samhällsvetare i bred mening. Efter hand som den samlade kunskapsmassan har vuxit har det blivit omöjligt för enskilda vetenskapsmän att ordentligt bemästra mer än begränsade delar av en enskild disciplin. För nationalekonomins del har detta inneburit att somliga främst sysslar med metod- eller teoriutveckling, medan andra främst ägnar sig åt applikationer. Ibland har bristande kommunikation mellan företrädare för de olika inriktningarna satt sina spår.*